
Driemaandelijks tijdschrift
Afgiftekantoor: Antwerpen X. ISSN 1013-2031
Jarkolekto 50 - trimonata
20/2

# IPR

# INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

**Redakta komitato:**
József Németh (red.)
Mireille Grosjean
Luigia Oberrauch Madella
Rob Moerbeek

**Kunlaborantoj de la aktuala numero:**
Nils Adler
Eric Baeni
Agnès Bardon
Luiza Carol
Vincent Defourny
José Antonio del Barrio
Latifou Gbadamassi
Gong Xiaofeng (Arko)
Mireille Grosjean
Jean Jaurès
Rafael Lima
József Németh
Cécile Plecenik








ilei

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

# ENHAVO


Enkonduko (Mireille GROSJEAN) .......... 3
Vincent DEFOURNY, Agnès BARDON: *Ĉefartikolo de Unesko-Kuriero [...]* .......... 4
Mireille GROSJEAN: *Hector Hodler, granda majstro* .......... 6
Jean JAURÈS: *Al la junularo 1903* .......... 7
*GONG Xiaofeng: Ĉesigi lernejvizitadon, sen ĉesigi lernadon* .......... 8
*Metafora signifo ne estas universala* (Mireille GROSJEAN) .......... 12
Cécile PLECENIK: *Kiel kuiri lingvolernadon?* .......... 13
*Ŝteli nepras / Pri lingvolernado* (Mireille GROSJEAN) .......... 16
*Festa ludvespero okaze de la 70-jariĝo de ILEI – parto IV.* (M. GROSJEAN) .......... 18
Intervjuo kun la Redaktoro (Mireille GROSJEAN – József NÉMETH) .......... 20
*La defio de la kvalito de lerneja edukado en DR Kongo* (Eric BAENI) .......... 24
El la landoj kaj sekcioj (BJ, CN, ES, RO) .......... 27
Alvoko al la enlernejaj Esperanto-instruantoj (A. ANDRE, G. CAMY, M. JUY) .......... 33
*Laboro en lernejoj por progresigi la komprenon de problemoj pri mensa sano (en Niĝerio)* (Nils ADLER) .......... 34
Programskizo de la 53-a Virtuala Esperanto-Konferenco ILEI (VEKI) .......... 35
Informoj pri ILEI, redakciaj informoj, adresaroj de funkciuloj .......... 37


# ESTRARO DE LA LIGO


**Prezidanto**: Mireille GROSJEAN „Mirejo", Grand-rue 9, cp 9, CH-2416 Les Brenets, Svislando. <*mirejo.mireille@gmail.com*>. Tel. hejma (+41) 32 932 18 88, portebla (+41) 79 69 709 66. Kunordiganto de la estrara laboro. Eksteraj rilatoj (UNESKO, FIPLV kaj aliaj). Informado pri la Ligo. Observanto de ILEI en la estraro de UEA kaj Komitatano A ĉe UEA. Eldonado de la du revuoj de ILEI.

**Vicprezidanto**: Ivan COLLING, DEPAC/UFPR, Ed. Dom Pedro I, Rua Gal. Carneiro, 560, Primeiro. Andar, Centro, BR-80060-150, Curitiba, PR, Brazilo. <*iecolling@yahoo.com.br*>. Eldonado de la Manlibro pri Instruado de Esperanto

**Sekretario:** Elena NADIKOVA, ul. Kadikova, 24-41, RU-428037 Ĉeboksari, Rusio, Tel. fiksa: (+7) 8352-648531, portebla: (+7) 919-670-25-34. <*lena_espero@mail.ru*>.

**Estrarano pri financaj aferoj**: William HARRIS „Vilĉjo", 4 Edgecomb Ct, Portland ME 04013, Usono. <*ilei.kasisto@gmail.com*>. Tel. hejma (+ 510) 653 0998.

**Vic-prizorganto de financaj aferoj:** Karine ARAKELJAN, 33 Khandjian Str., Apt. 4, AM-0010 Erevan, Armenio, Tel. poŝ.: (+374) 055-27-99-06. <*karinko_arm@mail.ru*>

**Estrarano**: JUNG Yuro „Unika", 101, Bonuru-Musashi, 9-11, Asahicyou 3, Kawagoe, Saitama JP-3501126, Japanio. Tel. poŝ.: (+81) 70-5569-6771. <*yurjun@st.amu.edu.pl*>. Reta komunikado, kongresaj aferoj, TEJO.

**Estrarano:** Radojica PETROVIĆ, Bul. oslobodjenja 36/14, RS-32000 Čačak, Serbio. Tel. hejma (+381) 32 371053. <*radojica.petrovic.rs@gmail.com*>. Universitata agado, Eŭropa komisiono de UEA, AEDE.

## Scienca Komitato

***Prezidanto*: Humphrey Tonkin**, Usono, University of Hartford; AdE[1]

***Membroj*:**

**Duncan Charters**, Usono, Principia College, Elsah

**Renato Corsetti**, Britio/Italio, Università degli Studi di Roma „La Sapienza”; AdE[1]

**Probal Dasgupta**, Barato, emerita profesoro de LRU, Indian Statistical Institute, Kolkata; AdE[1]

**Aloyzas Gudavičius**, Litovio, Šiaulių universitetas

**Boris Kolker**, Usono; AdE[1]

**Ilona Koutny**, Pollando/ Hungario, Uniwersytet im. Adama Mickiewicza w Poznaniu

**Stefan MacGill,** Nov-Zelando/ Hungario

**Aleksandr Melnikov**, Rusio, Академия Сельскохоз-яйственного Машиностроения, AdE[1]

**Radojica Petrović**, Serbio, Univerzitet u Kragujevcu

**Balázs Wacha**, Hungario, MTA Nyelvtudományi Intézet

[1] AdE – Akademio de Esperanto


**Sur la titolpaĝo:**
La 53-a Virtuala Esperanto-Konferenco ILEI (VEKI) (*vd. la programon sur p. 35*)

**Sur la dorskovrilo:**
Hector Hodler, pacisma sinteno (*vd. p. 12*)

# Enkonduko

*Karaj legantoj,*

Unue kaj plej grave; ke regu sano ĉe vi kaj viaj gefamilianoj; ke regu paco en via vivregiono. Okazas skuegoj en la mondo, neniu planado eblas, ni antaŭeniras en perokula navigado. Ĉu ni alkutimiĝis, alkutimiĝos al tio? Ĉu ni sukcesos trovi novan vojon por nia vundita mondo post la pandemio?

En tia etoso Jozefo kaj mi provis arigi interesajn tekstojn por vi. Jen la dua numero de IPR de la jaro 2020. Ni devas agnoski la valorajn kontribuojn de Luiza CAROL, kiu reviziis nian revuon dum 12 jaroj kaj pro okulmalsano devas esti for de ekrano. Ni substreku ankaŭ ŝian abundan kontribuon al la enhavo de *Juna Amiko*.

La financa situacio de ILEI ne estas brila; aŭ ni havu pli da membroj kaj pli da abonantoj de *Juna Amiko*, aŭ ni devos peti de la abonantoj de *Juna Amiko* rezignon pri la papera ricevo de la lasta numero de la revuo en decembro 2020. Fakto estas, ke la afranko kaj sendokostoj malekvilibrigas nian buĝeton. Bv helpi al la Ligo trovante novajn membrojn kaj novajn abonantojn de nia revuo JA, kiu ne estas nur por infanoj !

Mi deziras al vi agrablan legadon kaj ĉion bonan, kaj antaŭĝojas vidi vin sur mia ekrano okaze de nia Virtuala Konferenco en julio!

*Mireille GROSJEAN*

*Prez de ILEI*

# Ĉefartikolo de Unesko-Kuriero (okt.-dec. 2019)

*de Vincent* DEFOURNY *kaj Agnès* BARDON

Ĉi tiu sekcio *LARĜANGULE* estas publikigata por marki la Mondan Tagon de la Instruisto, celebratan la 5-an de oktobro ĉiujare.

„Malebla profesio”. Laŭ Sigmund Freud [ziːkmʊnt'fʁɔʏt], klerigado, samkiel regado kaj psikoanalizo, reprezentas entreprenon, „en kiu oni povas anticipe certi atingi nekontentigajn rezultojn”[1]. Ne estas facila tasko samtempe transdoni scion, teni klasĉambran disciplinon, stimuli scivolon, komuniki la regulojn pri kunvivado kaj trejni estontajn civitanojn.

La defio estas eĉ pli malfacile akceptebla en kuntekstoj, kiuj estas markitaj, tro ofte, per manko de rimedoj, plenplenaj klasĉambroj aŭ eĉ la risko, ke la origina celo de la instruisto perdas sian sencon.

Certe, ĉiu rekonas la ŝlosilan rolon de instruistoj. Je persona nivelo, ni ĉiuj povas nomi almenaŭ unu instruiston, kiu grave influis nin – kelkfoje tiel efike, ke tio redirektis nian tutan vivon. Je internacia nivelo, la Celoj por Daŭripova Evoluigo de Unuiĝintaj Nacioj (CDE) [*United Nations Sustainable Development Goals, (SDGs)*], precipe la Kvara Celo, rekonas la gravecon de instruistoj por plenumi la Celaron por Daŭripova Evoluigo ĝis 2030.



Tamen, la profesio estas sen-kreditigata. La evoluo de kogna neŭroscienco kaj la multaj aplikoj de novaj teknologioj en la kampo de klerigado devigas la profesion adapti kaj reinventi sin. Iam respektata kaj valorigata, la rolo de instruisto nuntempe estas kontestata, kaj instruistoj estas devigataj surpreni la respondecon pri la malsukcesoj de la klerigado-sistemo. Ĉi tiu negativa percepto pri ili – kelkfoje – rezultigas timigadon, aŭ eĉ perforton, fare de lernantoj aŭ iliaj familioj.

[1] Freud, S., 1937. Analysis Terminable and Interminable.

(*Surfote: Sandrine instruas en lernejo en Burkino, spite al tio, ke la lernejo havas nek akvon nek elektron. Foto de la filmado de la dokumenta filmo, Teach Me If You Can [Instruu min, se vi povas] [aŭ Instruistoj de la malebla], produktita de la franca filmkompanio Winds partnerece kun Unesko. Foto de Winds/É. Thérond*)

Fakte, estas tre malfacile por la profesio allogi novajn varbotojn. Post kelkaj jaroj de laboro, multaj instruistoj rezignas. Studo el 2014 farita en Usono pri 50 000 instruistoj[2] montris, ke pli ol 41% el ili (bazaj kaj mezaj lernejoj kune) rezignas la profesion post kvin jaroj.

Malgrandaj enspezoj, limigita profesia promocio, fortaj sociaj premoj kaj manko de rimedoj, ĉiuj ĉi estas faktoroj, kiuj malkuraĝigas gejunulojn entrepreni ĉi tiun karieron.

Krome, pli ol 69 milionoj da instruistoj varbendas ĝis 2030 por plenumi la CDEojn [SDGs]. Inter tiuj, 48,6 milionoj da novaj varbotoj necesos por anstataŭi la rezignantajn instruistojn. Jam estas grava manko de instruistoj en Okcidenta Azio kaj Subsahara Afriko.

En tiu kunteksto, kiel ni povas varbi novan generacion de entuziasmaj instruistoj? Tiu ĉi demando inspiris la temon de la okazigo en 2019 de la Monda Instruista Tago, la 5-an de oktobro: Junaj Instruistoj: La Estonteco de la Profesio.

Sed ekster la alarmaj nombroj, statistikoj kaj kaplinioj, ankoraŭ estas instruistoj ne malkuraĝigitaj de la malfacila situacio. Instruistoj, kiuj daŭre instruas en la plej malriĉaj lokoj kaj en plenplenaj klasĉambroj. Instruistoj, kiuj decidas labori kun lernantoj kun malfacilaj travivaĵoj, tiuj, kiuj estas ekster la lerneja sistemo aŭ loĝas en foraj regionoj. Instruistoj, por kiuj instrui estas sindevontigo kaj ĉiutaga klopodo. Estas tiuj instruistoj, kiujn la Kuriero honoras hodiaŭ.

*El la angla lingvo tradukis Rafael LIMA (Brazilo)*

---

[2] Ingersoll, R., Merrill, E., Stuckey, D. kaj Collins G., 2014, ĝisdatigita en oktobro 2018. Seven Trends: The Transformation of the Teaching Force. Consortium for Policy Research in Education (CPRE) Research Reports [Sep tendencoj: La transformado de la instruistaj fortoj. Esploraj raportoj de la Konsorcio por la esploro de klerigaj politikoj (CPRE)].

# Hector Hodler, granda majstro

*de Mireille GROSJEAN (Svislando)*



En la jaro 2020 ni devas malkovri tiun personecon de nia Movado aŭ plian fojon konsideri liajn pensojn, dirojn, farojn. Li naskiĝis en 1887 kaj mortis en marto 1920, do antaŭ cent jaroj. Fakto estas, ke li havis grandan influon sur la naskiĝo kaj strukturiĝo de nia Movado. Sed plie – kaj tio trafe devus interesi la ge-instruistojn – li arde pensis pri paco kaj arde skribis pri tio kiel atingi pacon.

Por la Komuna Legado okaze de la Tago de la Libro, la 15-an de decembro, ILEI en 2019 proponis verkon de Hodler: „Super”. En tiu kuraĝa kaj kuraĝiga teksto verkita en januaro 1915 li substrekis, ke esperantistoj devas resti fidelaj al siaj internaciaj amikecoj, eĉ se la grandaj potencoj deklaras liston de malamikoj. Esperantistoj estu pioniroj per toleremo kaj solidareco.

Ni praktikas interkulturajn kontaktojn ĉiutage. Ni kapablas rilati kun aliuloj kun respekto. Tion ni devas analizi kaj propagandi. Ni estas pioniroj. Okaze de nia 53-a Virtuala Esperanto-Konferenco ILEI (VEKI) kaj okaze de la Tago de la Lernado dum la Festivalo de UEA, pro la fakto ke tie ni celebros la 75-jariĝon de la Deklaracio pri Homaj Rajtoj, tiu interkultura edukado staros en la centro.

Hodler ne nur fondis UEA-n, sed li multon skribis pri la ebla organizado de nova paca mondo postmilita, li esploris pri pacismaj strategioj kaj skizis la strukturon de la Ligo de Nacioj. Li estis samtempe altnivela intelektulo kaj efika, racia kaj konkreta aganto. Pro tio liaj tekstoj aperontaj en nova libro prezentota en la virtuala UK estas aparte interesaj kaj riĉigaj. La aŭtoroj de tiu nova libro estas Ulrich Lins, Christian Lavarenne kaj Marine Englert, kunlaborantino de la Arkivoj Jura Brüschweiler, kiuj portas la eldon-projekton.

*Mireille GROSJEAN, tradukisto de tiu dulingva libro (eo + fr)*

# Al la junularo 1903

*de Jean J*AURÈS (https://eo.wikipedia.org/wiki/Jean_Jaurès)

La homaro estas malbenita, se por montri kuraĝon, ĝi estas kondamnita al eterna mortigado. Hodiaŭ kuraĝo ne konsistas el dismetado sur la mondo de milita nubo, terura nubo, sed dormanta nubo, pri kiu oni ĉiam povas esperi, ke ĝi trafos la aliajn. Kuraĝo ne konsistas en rezigno lasante en la manoj de la forto la solvon de la konfliktoj, kiujn racio povas solvi; ĉar kuraĝo estas plej homeca virto, kaj milito estas abdikado de ia ajn homeco. Por vi ĉiuj kuraĝo en ĉiuj momentoj estas elteni sen kliniĝo la malfacilaĵojn ĉiuspecajn, fizikajn kaj moralajn, kiujn la vivo al vi donas.

Kuraĝo estas ne liveri sian volon al hazardo de impresoj kaj fortoj; estas forkaŝi la neeviteblajn lacecojn de laboro kaj agado. Kuraĝo en la senfina malordo de la vivo, kiu tiras nin konstante, estas elekti metion kaj praktiki ĝin bone sendepende de tio kio ĝi estas: estas ne malkuraĝiĝi pro eta aŭ monotona detalo. (…) Kuraĝo estas esti ĉio kune, praktikanto kaj filozofo, sendepende de la profesio. Kuraĝo estas kompreni sian propran vivon, precizigi ĝin, profundigi ĝin, fortikigi ĝin, tamen adapti ĝin al la ĝenerala vivo. (…) Kuraĝo estas akcepti la novajn kondiĉojn, kiujn la vivo kreas al la sciencoj kaj artoj, akcepti, esplori la preskaŭ senliman kompleksecon de faktoj kaj detaloj kaj tamen lumigi tiun enorman kaj konfuzan realon per ĝeneralaj ideoj, organizi ĝin kaj subteni ĝin per la sankta beleco de formoj kaj ritmoj. Kuraĝo estas mastri siajn proprajn erarojn, suferi je ili, sed ne malkuraĝiĝi pro ili kaj plu iri laŭ sia vojo.

Kuraĝo estas ami la vivon kaj alfronti la morton per trankvila rigardo**, iri al la idealo kaj kompreni la realon**, estas agadi kaj sindoni al altvaloraj agadoj sen scii, kiun rekompencon donos al niaj klopodoj la profunda universo, nek ĉu ĝi entute donos rekompencon. Kuraĝo estas serĉi la veron kaj diri ĝin; estas ne submeti sin al la leĝo de triumfanta mensogo sen estonteco, ne doni eĥon per niaj animo, buŝo kaj manoj al la stultaj aplaŭdoj kaj al la fanatikaj kritikoj.

**Jean Jaurès, „*Discours à la Jeunesse*”, Albi, 1903**

**„iri al la idealo kaj kompreni la realon”:**

Tio plej trafe koncernas Hector Hodler, pri kiu aperas artikolo, kiun vi legis antaŭ tiu ĉi teksto.

# Ĉesigi lernejvizitadon, sen ĉesigi lernadon

***Mia sperto doni lekcion pri Esperanto enrete***

*Ĉesigi lernejvizitadon, sen ĉesigi lernadon*
*Mia sperto doni lekcion pri Esperanto enrete*

*de GONG Xiaofeng (Arko) (Ĉinio)*



Se ne okazus la epidemio, universitataj studentoj revenus al sia kampuso meze de februaro kiel kutime, kaj laŭ instru-plano instruistoj ekinstruus sian instru-objekton en klasĉambro. Ĉio ĉi estas disrompita de la subita epidemio de COVID-19, kiu ŝanĝis la ĉiutagan vivon preskaŭ de ĉiuj ĉinoj.

Por bridi propagiĝon de la epidemio de COVID-19 tra la tuta lando, Ĉinio prenas grandskalajn kaj fortajn rimedojn en la batalo kontraŭ la epidemio. La septaga feriodaŭro por la printempa festo longiĝis al 10 tagoj, plie ĝis 14 tagoj. Multaj provincoj rigore postulis, ke la diversaj entreprenoj ne rekomencu sian fabrikadon antaŭ la 9a de februaro, por ke oni evitu densan homfluadon inter provincoj kaj urboj. Ankaŭ universitataj studentoj troviĝas dise en diversaj provincoj. Nu, la 27an de januaro, la Ministerio pri Edukado publikigis avizon pri la prokrasto de la printempa semestro de 2020 ĝis la unua de marto, tio signifas, ke lernejoj ne rajtas rekomenci klasojn anticipe kaj studentoj ne rajtas anticipi sian revenon al universitato ĝis ili ricevos avizon de la loka edukadministracio aŭ de sia universitato.

Tre rapide diversnivelaj lernejoj eklaboras pri reta instruado laŭ la spirito de la Ministerio pri Edukado – ĉesigi lernejvizitadon, sen ĉesigi lernadon, t.e. anstataŭigi lekciaron per surrete sendataj lecionoj al studentoj.

De la komenco de februaro nia universitato jam eklaborigis la instruistojn tiom multe, ke ni sentas kvazaŭ la printempa semestro jam komenciĝis.

Fakte, laŭ la plano siatempa ankoraŭ restas du semajnoj da vintraj ferioj, tamen nia vic-lernejestro pri instruaj aferoj ĉiutage per tujmesaĝilo sendadis al ni en la lerneja retgrupo multajn mesaĝojn aŭ dokumentojn kiel malfermi retan kurson. Eĉ dum la daŭro de 4 tagoj ĉiun antaŭtagmezon fakaj specialistoj de reta eduka platformo faris retajn prelegojn por trejni instruistojn kiel krei sian instruobjekton kaj kurspaĝon ĉe la eduka platformo kaj kiel komenci rektan dissendon de sia kurso al la studentoj. Mi ĉeestis rete la unuan prelegon kaj ellernis kiel filmi la lecionon kun projekciaĵoj kaj voĉklarigoj. Pri aliaj flankoj jam du-tri jarojn antaŭe mi plenumis ĉe la platformo, ekz. la instruplanojn, ekzercojn, skizojn de ĉiu lecionperiodo ktp, danke al tio, ke nia lernejo pri Resursoj, Media kaj Kemia Inĝenierado estas elektita kiel unu el la tri pioniraj lernejoj, en kiuj ĉiu instruobjekto devus esti enretiginta sian retpaĝon por evoluigi perretan instruadon. Pro tio ni estas tre feliĉaj, sed por instruistoj el aliaj lernejoj aŭ institucioj de kiuj oni ankoraŭ ne postulis krei retan kurspaĝon, la preparlaboro ja vere estas peza.

Mi elŝutis la softvaron kaj ĝin instalis, provis, sinkronigis la projekciaĵojn kaj mian voĉon en filmoj kaj alŝutis ĉiujn bezonatajn materialojn al la eduka platformo. Tiuj studentoj, kiuj elektis mian kurson, povas anticipe memlerni ilin. Por kontaktiĝi kun ĉiuj kursanoj mi afiŝis ĉe la platformo, sciigante al ili, ke mi jam starigis retan grupon por nia kurso ĉe QQ, tre potenca tujmesaĝilo en Ĉinio, kaj lasis la pasvorton tie. Mirinde, tuj baldaŭ 27 el 51 studentoj sinsekve eniris la retan grupon, kvazaŭ ili jam longe atendus ĉe la platformo. Ĝis la sekva tago ĉiuj anoncis sin ĉe la grupo.

Finfine venis mia unua reta leciono. Estis ĵaŭde, la 20a de februaro. La leciono komenciĝis je 13:50 posttagmeze, sed fakte antaŭ horo mi jam estis preta ĉe miaj tekokomputilo kaj poŝtelefono. Antaŭ kelkaj tagoj la servilo de la platformo jam paneis plurfoje, ĉar kelkdekmiloj da studentoj samtempe ensalutis kaj uzis ĝin. Ofte okazis, ke aŭ instruisto elfalis aŭ studentoj ne povis eniri. Mia kolego konsilis, ke oni devas anticipe okupi lokon por ke ne trafu nin la retvoja ŝtopiĝo. Feliĉe, ĉio ĉe mi iris glate. Mi sukcese ensalutis kaj ankaŭ la 51 studentoj, kiuj anoncis sian ĉeeston dum mia postulita tempodaŭro, tion faris. Laŭ la statistiko pri la vizit-lokoj, 21 el la 51 studentoj apartenas al 17 provincoj ekster mia provinco Jiangxi; 17 studentoj troviĝas en nia propra provinco, la aliaj studentoj ne montris sian lokon. Neniu estas en la provinco Hubei, kies ĉefurbo WUHAN estas fermita pro la epidemio.

Por glatigi la donadon de mia reta leciono kaj eviti paneon de la retservilo, mi kunligis du softvarojn samtempe, t.e. la ret-platformon kaj QQ-tujmesaĝilon. Studentoj povas elekti iun ajn por aŭskulti kaj spekti laŭ sia

retrapideco aŭ plaĉo. Fakte ĉiun ajn el ili oni povas uzi aparte, tamen la platformo ne estas stabila, ĉar ĝi riskas panei. Ĉe QQ-tujmesaĝilo ĝia voĉ-vid-babila funkcio estas bonega, sed mankas lerno-registro aŭ spuroj, kiuj estas gravaj por studentoj kaj ankaŭ postulataj de la universitato. La eduka platformo povas mem registri kiom longe studento spektis la filmojn, kiom da fojoj li ensalutis, ĉu li plenumis la hejmtaskojn kaj kiom da poentoj li ricevis ktp. La poŝtelefono havas malgrandan ekranon. Por mi la teksto estas malfacile legebla, sed la samsistema APP havas funkcion de kurso-sinkronigo, nome la projekciaĵo sur la poŝtelefona ekrano samtempe povas aperi sur la tekokomputila ekrano. Tio estas tre grava funkcio.

Mi kundividis mian tekokomputilan ekranon kun la konversacia grupo ĉe QQ kaj studentoj povas samtempe vidi mian projekciaĵon kaj aŭdi mian voĉon kvazaŭ en reala klasĉambro. Kompreneble ni ankaŭ povas vidi nin reciproke per kamerao, se necesas. Plia avantaĝo ol en la reala lekcio, laŭ mi, kuŝas en tio, ke krom la voĉa babilado, mi povas vidi respondojn de studentoj en la konversacia fenestro.

Laŭ mia instruplano la unua lecionenhavo estas enkonduka leciono, koncize pri la historio de Esperanto, rakonto pri Zamenhof, la situacio pri la internacia komunikado kaj la prononco de la alfabeto.

Resume, dum la lecionperiodo mi starigis demandojn aŭ temojn jenajn:

1. Kiel mi ekkonis kaj eklernis Esperanton? Kiam Esperanto estas instruata en nia universitato?

2. Kial Zamenhof kreis Esperanton?

3. Kiel kaj kiam vi ekkonis Esperanton?

4. Kiu(j) estas via(j) motivo(j) lerni Esperanton? (1) intereso, (2) memfido lerni fremdan lingvon; (3) internaciaj informoj; (4) vojaĝi; (5) lerni novan lingvon; (6) amikiĝi kun novaj amikoj; (7) subteno de idealo; (8) komunika egaleco.

Fine estis ekzerco por silabado. Lernantoj voĉlegis vortojn kaj mi aŭskultis kaj ĝustigis, se necese.

Mi intencas veki intereson de studentoj pri Esperanto. Do, mi komencis la lecionon per mia rakonto „Esperanto kaj mi”. Kelkajn tagojn antaŭ la leciono, iu studentino demandis min, kial mi volas instrui Esperanton en nia universitato kaj kiel mi ekkonis tiun lingvon. Fakte ankaŭ la administrejo de edukaj aferoj ĉe nia universitato ne komprenas, kial mi, profesoro pri media

scienco kaj inĝenierado, elektis la lingvan kurson por instrui. La vic-estrino telefone demandis min, ĉu mi iam instruis ĝin? Ĉu mi havas ian testilon aŭ fotojn kune kun alilandanoj? Kompreneble mi havis. Mi prezentis al ili miajn atestilojn de KER-ekzamenoj kaj de Germana Esperanto-Instituto kaj ankaŭ kelkajn fotojn.

Post tio en la jaro 2017 Esperanto estis refoje akceptita kiel unu el la kursoj libere elekteblaj en nia universitato. Pro mia propra kaŭzo la oficiala nedeviga Esperanto-kurso ĉe nia universitato interrompiĝis dum 2010-2016, tamen siatempe mi daŭre instruis Esperanton al interesataj studentoj dum la postleciona tempo, ĉar en 2011 fondiĝis Esperanta Asocio por studentoj en nia universitato kaj mi, kiel la gvidanto, ofte instruas nian lingvon al la membroj.

Dum la lecionperiodo mi faris enketon al la tuta klaso, lanĉante diskutan temon ĉe la platformo: Kiel vi ekkonis Esperanton? Ĉu iu ĉe vi iam lernis Esperanton?

Laŭ la statistiko de la registroj en la platformo, 42 el 51 studentoj aliĝis al la diskuto, entute estis 50 mesaĝoj. 14 studentoj eksciis pri Esperanto pere de la Studenta Asocio de Esperanto en nia universitato; 16 studentoj nur eksciis la nomon Esperanto nur, kiam ili faris elekton inter nedevigaj kursoj; 7 studentoj antaŭe aŭdis aŭ legis pri Esperanto en interreto; 1 studento respondis, ke li elektis mian kurson pro la facileco de la lingvo; alia studento diris, ke li hazarde rimarkis Esperanto-klavaron ĉe sia poŝtelefono. Tio vekis lian scivolemon, do li serĉis ĉe interreto kaj tiel iom konis Esperanton.

Rilate la 4-an demandon, kiam mi vidigis la supremenciitajn ok motivojn antaŭ mia ekrano, tuj ĉe la konversacia fenestro venis la numero/numeroj elektitaj de studentoj. Plejparte ili elektis la unuan, la sesan kaj la okan, tuj poste estas la dua kaj la sepa motivoj.

Mi atente aŭskultis la prononcon de ili. Ne estis problemo. Kelkaj studentoj mirinde bone prononcis, unu el ili konfesis, ke li lernis la hispanan lingvon. Multaj studentoj diris, ke ili ne povas bone prononci „r”.

Vere mi ne atendis, ke la etoso estos tiel bona: ni klavadis, musadis, demandadis, respondadis... la tempo forflugis. Ĉe la fino de la kurso aŭdiĝis kaj aperis „Dankon!” „Ĝis revido!” kaj en la ekrano kaj ĉe la oreloj.

Kiam mi finis tiun raporton, mi jam donis la duafojan lecionon enrete. La informo pri la sumo de aliĝintoj iom ŝanĝiĝis: 2 studentoj nuligis mian kurson, sed 4 novaj studentoj aliĝis. Laŭ la regulo de nia universitato ĉiu

studento havas rajton nuligi aŭ ŝanĝi la elektitajn kursojn post la ĉeesto de la unuafoja leciono, poste li/ŝi ne plu povas ŝanĝi. Do, en mia kurso nun estas entute 53 studentoj.

Aldone pliaj informoj pri la studentoj: ili devenis el 15 lernejoj kaj institucioj de nia universitato, el 33 fakoj. Inter ili 10 studentoj estas el medicina lernejo, kie la prezidanto de la studenta Esperanto-asocio studas. Ĉiuj estas en sia unua universitata jaro, krom sep studentoj, kiuj estas en sia dua jaro, du en la tria jaro kaj unu en la kvara jaro.

## Metafora signifo ne estas universala

En preparo estas libro pri Hector Hodler surbaze de nove malkovritaj arkivoj en la manoj de la Fonduso Jura Brüschweiler en Ĝenevo, Svislando. La libro estas dulingva, franca kaj Esperanto. Mi ricevis la taskon traduki la franclingvajn ĉapitrojn al Esperanto kaj inverse.

Do mi estas pli aŭ malpli *perdita en traduklaboro,* laŭ la filmtitolo. Aperas facilaj frazoj, aperas obstakloj, demandoj, novaj nocioj, fakaj vortoj, kompleksaj frazoj… jen la laboro de tradukisto.

Kiam mi legis pri la infaneto Hector, ke li iam forlasis „le cocon familial”, mi devis pripensi. La vorto „kokono” ekzistas en Esperanto por esprimi tiun protektilon, kiun raŭpoj produktas por ŝirmi sin dum transiro al papilia formo, imagino. Temas do pri faka vorto en entomologio, la scienco pri insektoj.

En la franca tiu vorto kokono havas kromsignifon, ni uzas ĝin metafore por paroli pri protektata loko varma kaj sekura, dediĉita al idoj, etaj estaĵoj. Ĉar dum tiu laboro mi daŭre pensas, ke legos la tekston homoj el la tuta mondo pro la agado de Hector Hodler por fondi la Asocion UEA, mi provis scii, ĉu tiu kromsignifo estos komprenata ekzemple de azianoj. Do mi skribis al tri japanoj kaj tri ĉinoj. La tri japanoj respondis samopinie: tio estas vorto 繭 (prononcu maju) de la fako entomologio, ni ne konas tiun sciencon; la vorto ne estas uzata ekster tiu scienco. La tri ĉinoj respondis samopinie: tiu vorto kokono signifas problemojn, kiujn iu persono kreis al si mem; krei al si obstaklojn; fali en la kaptilon, kiun oni mem preparis.

Kaj tion mi bone povas kompreni: la raŭpo produktas fadenojn, per kiuj ĝi konstruas tiun limigan teritorion, do memproduktado. Certe vi konas la devenon de silko, tia fadeno produktita de raŭpo. Konsekvence mi elektis

alian vorton, mi tradukis tion per: familia nesto. La vorto nesto indikas kreskigejon, lokon por idoj, sed mankas la tegmento, ne ĉiuj nestoj havas tegmenton, mankas la ideo de protektado…. Sed traduko neniam estas centprocente ideala.

*Mireille GROSJEAN*
*Hector Hodler, pacisma sinteno*
Marine Englert, Ulrich Lins, Christian Lavarenne
Aperos en aŭgusto 2020 (*La kovrilpaĝo aperas en K4*)

# Kiel kuiri lingvolernadon?

*Laŭ Cécile PLECENIK*




https://www.youtube.com/watch?v=YoLBVCRePFU en la franca.

En ĉi tiu prelego pri lingvolernado okaze de la poliglota renkontiĝo 2018 en Bratislava (SK) Cécile Plecenik prezentas manieron lerni lingvojn. Do ŝi alparolas homojn, kiuj jam lernis kelkajn lingvojn.

Ŝia blogo nomiĝas JE TENTE en la franca (Mi provas)

Ni ĉiuj jam lernis unu aŭ plurajn lingvojn. Ĉiu havas sian stilon, sian manieron, sian metodon, siajn ŝatojn.

Mi volas nun kolekti kaj prezenti la komunaĵojn. La rezulto estos recepto por produkti poliglotojn.

La unua paŝo estas demandi al si, kial oni lernis, lernas iun specifan lingvon. Baze estas **motivado**. Povas esti, ke ni renkontis iun personon de tiu kulturo, povas esti evento en nia vivo, povas esti emo malkovri iun kulturon. Okazis io, kio puŝis nin al lernemo. Tamen ni havas profesion, studon, laboron, familion, taskojn. Do la motivado venas, foriras, fortiĝas, malfortiĝas. Ni ne povas kalkuli je ĝi por longtempe studi, ĝi ne estu nia bazo. Sed la motivado estas grava kiel fajrero por startigi la motoron.

Multaj homoj volas ĉion manĝi samtempe kaj rapide. Aliaj dediĉas 3 monatojn al prepozicioj, 4 monatojn al transitivaj kaj netransitivaj verboj. Tio tre oftas en la studplanoj. Oni konstruas amason, tiel oni dediĉas 5 jarojn al lernado de iu lingvo kaj finfine oni tute ne kapablas paroli ĝin. Ne povas esti fruktodona lernado, se la enhavoj estas arbitraj kaj se mankas rilato kun niaj celoj kiel parolonto de tiu lingvo.

**Unua ingredienco**: 500 g da **realismaj celoj**. Kion ni volas atingi? Kiujn kapablojn ni volas akiri?

**Dua ingredienco**: 0,5 litro da **sistememo**. Difini agadplanon kaj sekvi ĝin. Organizi siajn tagojn por trovi tempon por studi. Problemo estas, ke en la lernejo la elekto de la lingvo kaj de la metodo ne estas en la manoj de la lernanto. Multaj kredas, ke se ili aĉetas multekostan metodon, ili sukcesos rapide lerni lingvon. Ne aĉetu tian metodon! Mem elektu la lingvon kaj la metodon laŭ via emo.

**Tria ingredienco**: iom da **persona aktivado**. Oni organizu efike sian lernadon. Ne atendu, ke iu nutru vin. Tio dependas de via personeco, ĉiu havas sian stilon. Unu lernanto ŝatos kanti, alia ŝatos legi, tria ŝatos vojaĝi. En la kuirejo estas diversaj iloj: forko, miksa maŝino, kirlilo. Vi ne kirlas supon per forko, sed per kirlilo. Do faru same en lingvolernado: adaptu vian metodon, viajn ilojn al via celo. Kelkaj ŝatas forkon, aliaj manĝbastonetojn. Oni ne lernas paroli lingvon legante.

**Kvara ingredienco**: iom da **efikeco**. Tio estas persona afero, ĉiu havas sian stilon. Iu ekparolos tuj, la alia kolektos la erojn kaj parolos post maĉado kaj digesto. Elektu la resursojn, kiuj konvenas al vi.

**Kvina ingredienco**: iom da **unueco**. Ĉiu preparu sian saŭcon, sian miksaĵon.

**Sesa ingredienco**: du supkuleroj da **reguleco**. Lernu ofte en malgrandaj partoj kaj atendu kun pacienco, ke la kuirado en la forno okazu. Daŭrigu la studadon, ĝis vi kapablos diskuti en tiu lingvo, atingi sufiĉan nivelon, tio donos al vi motiviĝon denove. Ne utilas studi la vesperon antaŭ la ekzameno.

Bone miksu tiujn ingrediencojn kaj lasu en varma forno dum unu horo.

**Konkludo**

Kiam vi estos elektinta la lernotan lingvon kaj difininta la uzotan metodon por lerni paŝon post paŝo laŭ la de vi difinitaj celoj kaj kiam vi trovis bonajn kaj efikajn ilojn, kiuj harmonias kun viaj bezonoj, tiam vi lernos lingvon kun plezuro.

Okaze de **debato** Cécile aldonis kelkajn bazajn principojn:

Montriĝas, ke kuirante oni ekemas kuiri. Havi la bonajn ilojn helpas. Same kun lingvolernado.

Oni lernas farante erarojn. Tio estas neevitebla kaj normala. Memoru italan proverbon: antaŭ ol majstri lingvon, oni devas masakri ĝin.

Konstato: lingvolernanto kutimas esti tre optimisma. Tiu persono ofte aĉetas lernolibron kaj imagas, ke du monatojn poste li/ŝi povos flue babili hispane en Madrido. Tamen tiu persono devus imagi la studadon de gitaro: ne eblas eklerni kaj post du monatoj doni koncerton…

Persono, kiu lernas novan lingvon, ne nepre uzu la saman metodon, kiel li/ŝi uzis por lerni la antaŭan lingvon. Por ĉiu lingvo la celoj kaj metodoj povas esti malsamaj. Plie oni devas trovi la ilojn, kiuj estas je dispono. Pri kelkaj lingvoj evidentiĝos, ke mankas lernolibroj.

Pri lernado dum dormo: ŝajnas, ke okaze de la ekdormo diversaj memoraĵoj kaj fremdaj vortoj povas bone fiksiĝi en la cerbo. Tamen diversaj ĉarlatanaj metodoj volas uzi tiun argumenton. Atentu ne fali en kaptilon de vendistoj. Multaj metodoj proponas rapidan lernadon, malfidu ilin! La lernado bezonas tempon.

La lernanto devas organizi sian tempon, sian lernadon. Li/ŝi estas la subjekto. Li/ŝi estu aganto.

*Resumis kaj tradukis Mireille GROSJEAN*

# Ŝteli nepras



Mia aikido-majstro diris: ŝtelu! Rigardu ĉiun majstron, kiam li aikidumas, provu alproprigi al vi liajn movojn kaj teknikojn laŭ viaj komprenoj kaj ebloj.

Mia frizistino diris al sia lernantino: ŝtelu! Rigardu mian farmanieron kaj provu imiti ĝin!

La forĝisto diris al la juna artistino, kiu volis akiri por si mem liajn kapablojn: ŝtelu! Observu kaj provu mem!

La dancisto diris: mi ŝtelas! Mi observas la aliajn dancistojn, rigardas kaj poste mem provas. Foje mi sentas tion, kion mi vidis, kaj sukcesas eble ne imiti, sed krei per mia korpo ion similan aŭ simile belan.


Instruisto kutime estas sola en la klasĉambro instruante al lernantogrupo. Bedaŭrinde… Devus esti reciprokaj vizitoj. Tiel povus okazi tia observado kaj transdono aŭ transpreno de kapabloj.

Foje la lernantoj efikas kiel spegulo; ili raportis al mi farmanierojn de iuj el miaj kolegoj. Ekzemple: tiu instruisto faras dum iu testo demandopaŭzon. Laŭ tio li tutkomence disdonas la testfoliojn kaj klarigas ion, se bezonatas. Poste regu silento, kompleta silento. Se iu lernanto levas la manon, li ne reagas. Meze de la testodaŭro li interrompas la laboron kaj malfermas demandopaŭzon. Tiam povas veni demandoj kaj la respondoj iras al ĉiuj. Poste sekvas la dua duono de la testodaŭro, denove en kompleta silento. Tiel la lernantoj povas vere bone koncentriĝi kaj efike labori. Mi transprenis tiun farmanieron kaj ĉiuj estis feliĉaj pri ĝi, miaj lernantoj kaj mi.



Bona maniero kreskigi siajn instrukapablojn estas filmi la tutan lecionon por si mem. Tiel la instruisto malkovras siajn starmanierojn, siajn kutimajn

movojn, sian voĉomelodion, siajn ĉiam ripetitajn vortojn aŭ frazelementojn.



Li/ŝi konstatos spontanajn movojn, dirojn, farojn, pri kiuj li/ŝi ne konscias; la instruisto povas tiel malkovri, kiel li/ŝi reagas al eventoj en la klaso, al eraroj kaj demandoj de la lernantoj; li/ŝi povas observi sin mem, analizi tion kaj decidi fari modifojn en sia konduto, bremsi nedeziratajn movojn senutilajn. Kompreneble la preparlaboro pri la leciono kaj la pedagogie adekvata divido de la enhavo de la leciono restas en la centro de la instrukapabloj. Sed tiuj ne ĉefaj aspektoj de la instruado ne estas detalaj, ĉar montriĝas, ke la impreso ĉe la lernantoj estos 55% la aspekto de la persono de la instruisto, 38% tiuj ne parolaj komunikoj kaj 7% la diroj mem de la persono.

*Mireille* G*ROSJEAN*

# Pri lingvolernado




En vasta artikolo pri lingvolernado (ARC INFO, ĉiutaga ĵurnalo svisa, la 20-an de januaro 2020) mi legas aserton de la direktoro de *Balkan School*, kie iu povas lerni la anglan: „Bezonatas inter 80 kaj 120 laborhoroj por iri de iu nivelo al la alia (ekzemple de A1 ĝis A2 laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro KER). Ĉirkaŭ 18 monatoj bezonatas por iri al la sekva supera nivelo, tamen estas malfacile ion precizan promesi.” La ĵurnalisto plu komentas: Tiaj indikoj valoras por lingvoj, kiuj iom similas al la franca, kaj ne validas por la lernado ekzemple de la araba aŭ la ĉina.

Mi dufoje povis konstati, ke franclingvano praktikanta la germanan kaj la anglan lernis Esperanton de nulo al B2 ene de 60 horoj en tempospaco de du monatoj (po unu studhoron ĉiutage).

*Mireille* G*ROSJEAN*

# Festa ludvespero okaze de la 70-jariĝo de ILEI

(*daŭrigo*)

## PARIGU! (FAMULOJ)

| | |
|---|---|
| 1. DE DIEU | A. Eks-ĝenerala direktoro de UNESKO |
| 2. CYPRYCH | B. Direktoro de la CO de UEA |
| 3. MAYOR | C. Komisiito de ILEI |
| 4. NADIKOVA | Ĉ. Observanto de UEA ĉe ILEI |
| 5. MACGILL | D. Sekretario de ILEI |
| 6. MAGELHAES | E. Ĝenerala sekretario de UN |
| 7. SCHAEFFER | F. Kasisto de ILEI |
| 8. AZOULAY | G. Ĝenerala direktoro de UNESKO |
| 9. GUTTEREZ | Ĝ. Eks-prezidanto de ILEI |
| 10. HARRIS | H. Kunlaboranto de la CO de UEA |

## PARIGU! (URBOJ KAJ EVENTOJ)

| | |
|---|---|
| 1. OOSTENDE (BE) | A. ĜENERALA KONFERENCO DE UNESKO KUN DUA UNESKO-REZOLUCIO |
| 2. BOURNEMOUTH (UK) | B. UK DE UEA 2018 |
| 3. BULONJO ĈE MARO (FR) | C. ILEI-KONFERENCO 2015 |
| 4. MONTEVIDEO (UY) | Ĉ. UK DE UEA EN 1949 |
| 5. SOFIA (BG) | D. LOĜURBO DE LA SEKRETARIO DE ILEI |
| 6. LISBONO (PT) | E. UNUA UK EN LA HISTORIO DE ESPERANTO |
| 7. NYÍREGYHÁZA (HU) | F. LOĜURBO DE LA ESTRARANO DE ILEI PRI KONGRESOJ |
| 8. HERZBERG (DE) | G. ILEI-KONFERENCO, DUM KIU M. GROSJEAN ELEKTIĜIS PREZIDANTO DE ILEI |
| 9. ĈAĈAK (RS) | Ĝ. ILEI-KONFERENCO POST UK EN NITRA, SLOVAKIO |
| 10. ĈEBOKSARI (RU) | H. URBO DE LA UNUA REZOLUCIO DE UNESKO 1954 KAJ DE LA ILEI-KONF. 2014 |

# KVIZO

1) Kiom da sekcioj ILEI havas?

| | | |
|---|---|---|
| 39 | 43 | 50 |
| A | N | Z |

2) Kiom da estraranoj ILEI havas?

| | | |
|---|---|---|
| 5 | 7 | 9 |
| X | I | B |

3) Nomo de la organo de ILEI

| | | |
|---|---|---|
| IPR | JA | RE |
| X | J | C |

4) Ĉu povas esti du (02) sekcioj de ILEI en la sama lando?

| | | |
|---|---|---|
| jes | ne | mi ne scias |
| O | U | V |

5) La oficiala arĥivajo de ILEI estas en

| | | |
|---|---|---|
| Roterdamo | Massa | Herzberg |
| R | P | N |

Eks-prezidanto de ILEI:

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| | | | | |

## Kompletigu la titolon!

a) Temas pri lernolibroj kaj aliaj.

b) La indiko ( ) estas la aŭtoro.

1. Tom kaj ………………………………………....
2. Vojaĝo en ………………………………… (**Boris Kolker**)
3. Liza kaj …………………………………  (**Reto Rossetti**)
4. La …………….. …………. Metodo (**William Perrenoud**)
5. Esperanto per ……………….Metodo  (**Stano Marcek**)
6. Paŝoj al Plena ……………………..…..(**William Auld**)
7. La ………………………………. Lingvo (**Claude Piron**)
8. Poŝ…………………………………….. (**Katalin Kovats**)
9. ……………………… li venis trakosme? **(Claude Piron**)
10. Aventuroj de ……...………………….  (**Edmond Privat**)

Kiuj ne estas lernolibroj ? ………………………………………

…………………………………………………………………….

**Noto**: Ĉiuj solvoj de la kvizoj de la 52-a Kongreso aperos en unu dok en la retejo ilei.info.

# Intervjuo kun la Redaktoro

*La redaktoro de Internacia Pedagogia Revuo Sinjoro Jozefo Nemeth el Hungario travivis gravan eventon la 13-an de marto 2020. Se mi bone komprenis, temas pri defendo de via majstropedagoga titolo. Ni iom eksciu pri tio, kio estas en via kariero!*


En la jaro 2013 la registaro enkondukis novan karier-sistemon por hungaraj pedagogoj. Post la diplomiĝo sekvas periodo, kiam la pedagogo laboras kiel „praktikanto" (ĉiuj, kiuj havas malpli ol dujaran instrusperton, estas en tiu kategorio). Se la praktikanto volas resti en sia profesio, li devas trapasi

ekzamenon por akiri la titolon „Pedagogo 1”. Post paso de minumume 6 jaroj venos la lasta deviga ekzameno, per kiu li/ŝi definitive pruvas, ke li/ŝi taŭgas por tiu ĉi profesio, kaj li/ŝi ricevas la titolon „Pedagogo 2”. Plia ebla, sed ne deviga grado, estas la akiro de la titoloj „Majstropedagogo” aŭ „Esplorpedagogo”. Tie la kandidatoj devas pruvi ne la kapablojn instrui, ĉar tion ili jam pruvis pli frue. Majstropedagogoj devas pruvi, ke ili konstante kaj konscie plulernas, esploras/analizas la pedagogiajn procedojn, trovas, ellaboras novajn metodojn, transdonas la akiritajn spertojn al la kolegoj. (Esplorpedagogoj unuavice analizas problemojn kaj verkas artikolojn, librojn).
Mi estis inter la unuaj pedagogoj, kiuj en 2015 partoprenis en projekto, kompilis majstroprogramon kaj komencis realigi ĝin komence de 2016. Sed tiu titolo ne estas ĝismorta: ĉiun kvinan jaron oni devas raporti pri la atingaĵoj kaj kompili novan programon. La programo estas akceptata, se la kandidato akiras 85%-ojn de la akireblaj poentoj (mi akiris 100%).
La sistemo havas ankaŭ financan flankon: tutkomencanta pedagogo ĉe ni ricevas ĉ. 550 eŭrojn monate. La salajro altiĝas ĉiun trian jaron kaj ankaŭ la nombro kaj tipo de diplomoj influas ĝin, sed post la akiro de la supre menciitaj titoloj la salajro grave kreskas. Se iu havas 30-35-jaran instrusperton, akiras majstropedagogan titolon kaj krome li/ŝi estas klasestro aŭ estro de lerneja laborgrupo, lia/ŝia neta salajro estas ĉ. 1 000 eŭroj. Pro la malalta salajro de komencantoj, la pedagogan laboron elektas malmulte da junuloj, la averaĝa aĝo de hungaraj pedagogoj estas proksima al 50 jaroj. Pro la emeritiĝoj, post 5-10 jaroj la eduka sistemo alfrontos gravan problemon.

*Vi instruis Esperanton. Kiom longe? Al kiu publiko? Per kiu metodo?*

Mi komencis lerni la lingvon en 1979, tute hazarde, kaj la sekvan jaron mi jam „instruis” en somera lernejo de Jozefo HORVÁTH (Piloto) apud Balatono. Poste mi organizis altlernejan grupon. Fininte la altlernejon en mia nova loĝloko, la urbo Pápa, mi (re)organizis la urban grupon kaj ekde 1985 mi instruis ĝin en la Kulturdomo de Pedagogoj kaj en fakrondoj de la bazlernejo, kie mi laboris. Krome ĉiun someron mi instruis ĝin en internaciaj someraj lernejoj en Szombathely. Tie ni uzis la aŭdvidan lernomaterialon de Blazio Wacha. Ĉe la reĝimŝanĝo fine de la 1980-aj jaroj la rusa iĝis ne plu deviga lingvo kaj ĉiuj 70 gelernantoj elektis Esperanton kiel la unuan (kaj solan) fremdlingvon. Ili lernis ĝin 5 jarojn kaj dekduo el ili trapasis sukcese mezgradan lingvoekzamenon. En la instruado mi uzis la lernolibrojn de István Szerdahelyi, de Helena kaj Jozefo Mikulás kaj la serion *Tendaraj Tagoj* de Stefan MacGill. Dum 10 jaroj niaj lernantoj akiris 17 unuajn lokojn

en la diversaj landaj Esperanto-konkursoj. Sed pro diversaj homaj kialoj la situacio de Esperanto malfaciliĝis kaj en 1995 mi decidis, ke anstataŭ la instruado de Esperanto, mi faros redaktan kaj movadan laboron.




*Kaj nun pri viaj kontaktoj kun aliaj Esperanto-instruistoj: kion tio alportas al vi por via praktiko? Pri viaj kontaktoj kun aliaj instruistoj, ĉu ili povis konstati, kiom tiuj Esperanto-kontaktoj riĉigas vin kaj vian instruadon?*

En la florepoko inter la jaroj 1985 kaj 1995 mi regule invitis eminentajn gastojn al mia lernejo kaj al la kulturdomo, kiun mi gvidis. Ankaŭ miaj kolegoj povis vidi la prelegojn de miaj eksterlandaj kaj hungaroj gastoj, renkonti ilin, kiam ili gvidis lecionon en mia lernejo. Ankaŭ miaj kolegoj partoprenis en la vizitoj al Kroatio kaj ili gastigis la kroatajn infanojn reciproke. La kroataj infanoj riĉigis la kulturajn festivalojn de mia urbo, jen per dancado, jen per ekspozicio. La geedzoj RÖSSLER vizitis nian lernejon

plurfoje. Ili riĉigis la kulturan vivon de mia urbo: ili havis plurajn ekspoziciojn en mia urbo, verkis kaj eldonis librojn, parte ligitajn al Hungario, kiun ili ekkonis danke al iama lernantino mia. Sed miaj kontaktoj kun Esperanto-instruistoj kelkfoje restas kaŝitaj. Malmultaj scias, ekzemple, ke nia redakciano Luiza CAROL, laŭ mia peto, verkis teatraĵon, kiun, post traduko al la germana lingvo, plurfoje prezentis bazlernejo de mia urbo en diversaj konkursoj kaj festoj. Danke al miaj kontaktoj enlandaj kaj eksterlandaj, mi havas superrigardon pli vastan, mi informiĝas rekte kaj ne tra la filtriloj de amaskomunikiloj kaj tion vidas ankaŭ miaj kolegoj.

Antaŭ ol kompili la konkursmaterialon por defendi mian majstropedagogan titolon, mi demandis respondecan gvidanton de eduka instanco, ĉu mi rajtas starigi la celon, ke mi laboras en ILEI kaj en ILEI-HU. Tio ja ne alportas rektan utilon al mia lerneja laboro. Responde ŝi diris: „Vi nepre rajtas havi tiun celon, ĉar per tiu agado vi kontribuas al la evoluigo de la landa/monda eduksistemo, kaj nur tio gravas, ne la tuja aŭ nurloka utiliĝo”.

Dum la defendo de mia konkursaĵo mi detale parolis pri mia ĝisnuna kaj estonta agado en ILEI-HU kaj ILEI, mi prezentis nian organon IPR. Laŭ mi, la kulmino de la tuta evento estis la momento, kiam mi prezentis al la publiko la diplomon, kiu pruvas, ke oni internacie rekonis mian agadon: mi iĝis Honora Membro de ILEI en 2019.

*Kion signifas por vi la laboro en la redakcio de IPR?*

Kiel mi raportis pri tio en la jubilea numero de IPR (2019/4), mi iĝis redaktoro en 1995 danke al pluraj koincidoj: la antaŭa redaktoro ne plu povis fari tiun laboron, mi ĵus eklernis la komputilan tekstoredaktadon, mi ĉeestis la kunsidon, kie oni nepre volis decidi pri nova redaktoro ktp. Kaj kiel en pli frua respondo mi menciis, pro la malfaciliĝo de Esperanto-instruado en mia lernejo, pere de la redakta laboro mi trovis bonan terenon, kie mi povis fari „ion utilan” por Esperanto. Krome, estis bona kaj samtempe iom „timiga” sento iĝi redaktoro de revuo, kiun oni legas en 60 landoj kaj kiun antaŭ mi redaktis tiom elstaraj kolegoj kiel Helmut Sonnabend, István Szerdahelyi, István Ertl, Stefan MacGill kaj Márta Kovács.

Dum la lastaj 25 jaroj tiu laboro iĝis grava kaj konstanta parto de mia vivo. Mi redaktis jam pli ol 4 000 paĝojn da fakmaterialo, kaj vole-nevole ankaŭ tiuj artikoloj kontribuis al miaj fakaj scioj kaj spertoj.

*Kion signifis por vi la organizado kaj partopreno en tutmonda konferenco de ILEI en via lando?*

Fakte mi ne estas kongresema homo kaj la ideo, ke ILEI-HU kandidatiĝu por organizi la Konferencon en Nyíregyháza, venis ne de mi. Aldone, tiu urbo estas en tute alia parto de mia lando, do, la plej grandan laboron faris ne mi, sed la LKK kun gvido de nia karmemora Enikő Sereghy Zengő. Tamen mi helpis en la antaŭpreparoj kaj ankaŭ surloke, sed la danko iru al miaj kolegoj en tiu regiono. Mi ĝuis la Konferencon. Dum la prezentado de mia majstropedagoga programo mi detale raportis pri tiu konferenco al la ekzamena komitato kaj al la invititoj de la evento kaj mi ankaŭ projekciis la titolpaĝon de la koncerna numero de IPR.

*Kara Jozefo! Ni deziras al vi plenan sukceson en via laboro en via lernejo kaj ni ĝuas kaj esperebl ankoraŭ dum multaj jaroj ĝuos vian altkvalitan redaktan laboron por nia revuo IPR.*

## La defio de la kvalito de lerneja edukado en DR Kongo

**Enkonduko**

Malgraŭ la seniluziiĝo, kiu havas multajn kaŭzojn kaj donas persistan doloron, ni devas strebi por elradikigi ĝin; la lernejo daŭre mobilizas la kongolandan popolon kaj devus doni gravan esperon, pli ol malriĉecon, nescion kaj subevoluon. Tamen kongaj lernejoj estas tre malbonaj, kaj la starigo de kvalitoplena lernejo estas nepraĵo, kiu postulas gravajn ŝanĝojn fare de ĉiuj koncernatoj kaj konsumantoj de kongaj lernejoj. Aidoso mortigas, kaj malbona lernejo same negative efikas, ĉar ĝi estas la plej malutila viruso en kunteksto de kronika subevoluo. La rimedoj uzataj kontraŭ tiu situacio devas kvarobliĝi por rekonstrui efikajn lernejojn tra DR Kongo.

**Defioj**

La unua evoluo devas esti la determino de la publikaj aŭtoritatoj mobilizi sin kaj komenci la vojon de vera ŝanĝo. Efektive, konsiderinda penado al edukado por ĉiuj estos senefika, se la mobilizo de la Ŝtato estas nekompleta. Kaj se la Ŝtato ne plene klopodas, ajna perspektivo de daŭrigebla disvolviĝo daŭros foren.

Sperto montris en multaj kazoj, ke la engaĝiĝo de la registaro estas unu el la necesaj kondiĉoj por la sukceso de ĉiuj lernejaj reformoj. Tamen, ĉi tiu devontigo implicas, ke decidpovaj agantoj devas ne nur montri pli grandan kreemon, sed ankaŭ kuraĝon kaj persistemon, same kiel estis la kazo por finigo de la milito, ĉar la dimensio de la defioj lasas momenton nek por improvizado nek por amatora laboro. Grandaj malbonoj postulas grandajn rimedojn kaj forton de volo. Tro ofte tiu strategia sektoro restas por amatoroj kaj ĉiofarantoj, kiuj havas apogon en sia pasinteco.

Krome, okupiĝi pri konstruado de efika kaj bonega trejnada sistemo postulas klaran vizion de edukado surbaze de la aspiroj de la socio kaj de la defioj de tutmondiĝo. Tia vizio devas elpreni lecionojn el la pasinteco kaj spertojn kaj eviti fari la samajn mortigajn erarojn por junuloj kaj por la lando.

La diverseco de edukaj politikoj, tra neregistritaj iniciatoj organizitaj per sufiĉe malpreciza alproksimiĝo rezultigas signifan malŝparon de rimedoj kaj malmobilizadon de agantoj. Strategia vizio devas integri la organikan dimension, kiu ligas la malsamajn stadiojn de edukado. Kaj kiam ministro ne regas la realon de la elementa kaj meza lernejoj de la momento, li estas maloportuna. Efektive, inter elementa, mezlerneja, gimnazia kaj universitata instruadoj estas kontinuaĵo, kiu postulas strategian tutmondan alproksimiĝon en la difino de edukaj politikoj: la instruistoj de bazaj lernejoj restas duarangaj, mezlernejaj instruistoj estas trejnitaj ĉe pli altaj institucioj. Precipe, la supera mezlernejo kaj la universitato produktas la eliton kaj la naciajn kadrojn kapablajn traduki laŭ siaj ebloj la landajn bezonojn kaj aspirojn de la konga popolo esperante efikan edukan politikon, prosperan ekonomion, sanon, kulturajn esprimojn ktp. Iu, kiu neniam studis en konga klaso, povas nur supraĵe trakti la profundajn problemojn de la konga lernejo. Simpla ekzemplo estas, ke tre malmultaj regulaj lernantoj aperas, eĉ en pli bonaj lernejoj. Krome, la tempo dediĉata al la lernado de la franca estas tre nesufiĉa konsidere la tempon dediĉatan al la historio kaj geografio de duagrada nivelo. Kongano neniam facile povus esti lernejestro en Japanio!

La klara eduka vizio ne sufiĉos por garantii la sukceson de bona eduka politiko. Ĉi tiu vizio devas esti difinita ene de realisma, bone pripensita programo, aranĝata de altkvalita gvidado. Efektive, pensema gvidantaro, viziulo ambicia, pragmata kaj efika estas esenca por atingi kvaliton de lernejoj kaj kaŭzi mutaciojn necesajn por la sociekonomia evoluo.

Moviĝi al fundamenta edukado en naciaj realaĵoj estas urĝa neceso, el kiu la lando kaj ĝiaj gvidantoj ne povas eskapi, riskante pligravigi la distancon inter la lernejo kaj la aspiroj de la loĝantaro kaj naciaj bezonoj.

Alia disvolviĝo devas esti la evoluigo de instituciaj kapabloj kiel fundamenta modelo por la evoluigo de la konga edukado. Estus malŝparo de penado havi sciencajn programojn „imititajn aŭ kopiitajn", se mankas la necesaj kapabloj efektivigi ilin. Instituciaj kapabloj devas esti konstruataj surbaze de strategio de firmigo kaj plibonigo de kapabloj, por certigi la daŭrigeblan evoluon de sukcesa lernejo.

Ĉi tiu strategio supozas la antaŭan identigon de la malfortoj kaj trejnadaj bezonoj de edukadaj administradoj kaj entenas strategion por efike evoluigaj kaj organizaj kapabloj, kun klaraj celoj kaj regulaj monitorado kaj taksado. Simple traduki sukcesajn alilokajn spertojn ne ĉiam garantias sukceson en alia kunteksto, eĉ se ili povas inspiri la skizon de novaj politikoj provizante per sekuraj referencoj kaj ŝparado de energio.

Internaciaj institucioj povas kontribui al la evoluigo de nia eduka sistemo sen anstataŭi la ŝtaton kaj la homojn. Ni devas redifini aŭtentan partnerecon bazitan sur veraj justeco kaj solidareco, sed la nacia estraro devas plenumi sian rolon. Eĉ se dezirindaj estas la intervenoj de eksteraj partneroj, ili ne povas efike anstataŭi la registaron en ĝia nacia evoluiga misio. Nia lando devas antaŭ ĉio fidi je siaj propraj rimedoj por gvidi ĉiujn junulojn al daŭripova evoluo.

Koncerne sciencan esploradon, la apero de novaj problemoj ekestantaj de la pliigita postulo pri kvalito ne kondukis al renovigo de aliroj, kiuj daŭre favoras la logikan administradon, per la serĉado de ekvilibro, raciigo kaj optimumigo de edukaj elektoj kaj decidoj. Edukadplanado en DRK estas delonge enŝlosita kvanta paradigmo, efike foriganta fundamentajn demandojn pri la socia kaj individua signifo de lerneja edukado.

Hodiaŭ, por esti pli efika, ĝi devas esti malfermita al pli kvalitaj aliroj, kiuj ebligas pli bone kaj pli profunde kompreni la socian kampon.

Pro tiaj manieroj, nia eduka sistemo povas esti akordigita kun la esperoj de la konga popolo, fariĝi vera ilo por daŭrigebla disvolvado kaj rimedo de individua kaj kolektiva evoluo. Ĉar, malgraŭ la malfacilaĵoj, espero restas permesata, sufiĉas mobilizi nin por efika lernejo por plene partopreni en scienca kaj teknologia progreso cele al bonfarto de ĉiuj.

**DR Kongo: Kial la lernejo malsanas?**

La konga lernejo grave malsanas. Tio estas la unuanima konkludo, kiu aperas el la kritikoj, kiuj estas diritaj de ĉiuj flankoj. Kun la progreso kvalite kaj kvante en la 1970-aj jaroj, oni ne povis imagi, ke kvindek jarojn poste oni ankoraŭ povas vidi lernantojn sidantaj sur la planko, lernejojn sen necesejoj, aŭ mezlernejajn diplomitojn malĝuste parolantaj la francan.

**Kiel klarigi ĉi tiun fiaskon de la lernejoj en DR Kongo?**

Malproksime de la lernejaj „feliĉaj jaroj" en DRK, nuntempe la raporto ne estas tre hela. Baza edukado suferas pro nesufiĉa ekspansio. Kvankam ĝi kreskis je 7%, de 2006 ĝis 2007 ĝis 2007-2008, de 84% ĝis 91%, la indico de lernejado ankoraŭ ne atingis 100% (en la jaro 2008). Krom la malalta nivelo de partopreno, la difekto de la kvalito de elementa kaj duagrada edukado estas evidenta; ĉi tio estas klare videbla en la fakto, ke plej multaj bazlernejanoj ne akiras la lingvajn kapablojn necesajn por plua edukado. Kiel pruvo, en normigitaj testoj en la franca, la meza poentaro de kongolandaj lernantoj de la 4-a jaro estas pli malalta ol tiu de francaj studentoj de la 2-a klaso, 44.1% kaj 72.7% respektive (Monda Banko 2003). Ĉi tio reflektas la malfacilaĵojn de regado de la instruata lingvo en eduka kunteksto preskaŭ sen skribaĵoj kaj instruaj materialoj. La legokapablo de kongaj studentoj ankaŭ influas ilian malkapablon pri legado kaj aliaj studobjektoj kiel ekzemple matematiko. Samtempe korupto eniris la lernejon. Ĉeesto kaj fi-kopiado ne plu estas la solaj rimedoj de „sukceso", iom da mono sufiĉas por eniri la superan klason.

Plie, estas la tielnomata fenomeno „sekvaĵo" ĉe la mezlerneja nivelo: lernej-estroj postulas monon por motivi la findecidopovajn personojn (kiuj estas la inspektistoj respondecaj pri ŝtataj ekzamenoj) por ebla sukceso de sia lernejo. Ĉi-lastaj eldonas poentolibretojn kontraŭ donacoj de gepatroj. Koruptado estas forta indikilo de malriĉeco en iuj privataj lernejoj (kaj en la plej multaj publikaj lernejoj). Tiu malriĉeco entenas plurajn aspektojn: la klasĉambroj estas ĉiam superplenaj (superaglomera indico de 39% de la klasoj en baza kaj 24% duagrada laŭ Eneco-esploroj en 2001), malbone ekipitaj kun infanoj sidantaj sur la planko; instruistoj, kiuj estas malbone pagataj kaj finance subtenataj de gepatroj ktp. La aktuala situacio de la edukado estas ligita al la ekonomia krizo, kiu eksplodis en DR Kongo ekde la fruaj 1980-aj jaroj. Fakte, la parto de la publikaj elspezoj por edukado komencis malkreski akre kiel de 17 en 1983 al 7% en 1985 (Monda Banko 2003). Ĉi tiu akra malpliiĝo de edukaj elspezoj okazis ĉefe pro pli malaltaj prezoj de produktoj, kiuj

devigis la Ŝtaton redukti publikajn elspezojn. Tiu krizo pli malboniĝis ekde la fruaj 1990aj jaroj kun la alveno de arma konflikto. Tamen mastrumado de publikaj elspezoj estas ankaŭ malproksime de la plej bonaj. En ĉi tiu kunteksto de ŝtata maltaŭgeco la privata sektoro transprenis la laboron. La privata sektoro kontribuas al la financado de la edukado en DR Kongo inkludigante la bezonaĵojn kiel ekzemple libroj kaj lernejaj bezonataĵoj, transportado, ekipado kaj vivtenado de klasoĉambroj, instruistaj salajroj kaj urbajn elspezojn kiel ekzemple por konstruado de lernejoj. La edukado en DR Kongo estas tiel dependa de la kapablo de gepatroj por certigi la lertigadon de iliaj infanoj. Tamen, konsidere la aktualan salajronivelon, plej multe da homoj ne povas sendi siajn infanojn al lernejo. Do la malriĉeco de gepatroj estas faktoro de malalta lerneja frekventado (Mumpasi kaj Ngondo 2003).
Ekzistas plivastiĝo de la privata sektoro en DRK. Laŭtakse 70% de la baza edukado estas administrata de privataj lernejoj (PMPTR 2006). Se ni komparas la reĝimon, la privata tenas la plej grandan nombron da lernejoj, tio estas 72%; ĉi tiu procento estas eĉ pli alta kompare kun 2008, kiam estis 68% (SSA 2009). Tiuj privataj lernejoj estas la plej bonaj kaj la plej malbonaj (Kitaev 1999). Kompreneble, la efikeco de la privataj lernejoj estas pli forta ol tiu de la publikaj lernejoj, en ripetofteco, reteno en la ciklo kaj efikeco de edukado (Hennaff 2003). Tamen, la evoluo de la privata sektoro okazis en katastrofaj kondiĉoj (kadukaj infrastrukturoj, manko de ekipaĵo kaj lernolibroj, malbona stato de klasĉambroj ktp.). Ĉi tio kondukas al malpliiĝo de la kvalito de instruado. Konsidere la mankojn de la eduka merkato, korupto kondukas al malstreĉiĝo en la akiro de rajtigoj por la kreado de lernejoj. Ĉi tiu eksplodo en la nombro de privataj lernejoj en malklara fiksado ankoraŭ pli malfaciligas taksi la kvaliton de kapabloj (la konkurencprocezo ankoraŭ ne elektis la „plej bonajn praktikojn”) kaj tiel malfaciligas ankaŭ la trejnadon de lernantoj forlasontaj lernejon.

Emfazendas: ne ekzistas vera industria evoluo. Tamen, la manko de „kompetent-merkato” permesas al la plej malbonaj privataj lernejoj esti malbonkvalitaj – kiuj ne estos sankciitaj nerekte en la labormerkato. Mallonge, la situacio de la kongolanda lernejo estas timiga. La defio estas sukcesi sproni ĝin per dinamika evoluigo per reformado de la eduka sektoro. La konga Ŝtato devas plibonigi la kvaliton de administrado bremsante korupton, kiu administrado ne nur helpu batali kontraŭ malriĉeco per industriigo, sed ankaŭ kreu sanan konkurencon de privataj agantoj en DRK-edukado.

*Skribita de Eric BAENI en la „Lukto por perfekta edukado”.*


# El la landoj kaj sekcioj

## Benino




Esperanto-instruado relanĉiĝis ĉi-lernojaron en la ŝtataj mez-lernejoj n-ro 1 kaj 2 de Lokossa gvide de Latifou GBADAMASSI Ĉe la mezgrada lernejo n-ro 1 la kurso startis la 22-an de novembro 2019 kun 24 ĉeestantoj. De tiam ĝis nun, jam okazis 8 kurskunvenoj en tiu lernejo. Ĉe la lernejo n-ro 2, la unua kurso okazis la 5-an de februaro 2020 kun 40 vizitantoj. Du pliaj kursoj estis gviditaj en la februara unusemajna feriaro. En ambaŭ kazoj, la kursanoj estas inter-9-kaj-22-jaraĝaj. Krome, la 1-a, 2-a, 5-a, 6-a kaj 7-a estas iliaj studjaroj. La kurskunvenoj donis eblon al la ĉeestantoj lerni pri kelkaj bazaj reguloj de Esperanto. Temas interalie pri: legado kaj skribado de la alfabeto de Esperanto; artikoloj difina kaj nedifina (singularo kaj pluralo); finaĵoj de substantivoj, adjektivoj, adverboj, pluralo kaj infinitivo; salutado; nombroj (de 0 ĝis 20); prefikso (mal).

## Ĉinio




Sinjoro Hu Guozhu (Miĉino), (1938-2020), 82-jara elstara ĉina esperantisto, forpasis la 22-an de aprilo 2020 en la Hospitalo Tongji de WUHAN pro multjara malsano. Hu Guozhu, individua membro de UEA, honora komitatano de Ĉina Esperanto-Ligo, honora membro de ILEI (2017), estis fama Esperanta poeto, verkisto, tradukisto, kaj profesie supera inĝeniero. Li komencis memlerni Esperanton en 1956. Aliĝis al la Hubei-a Esperanta Asocio en 1979 kaj estis ĝia vicprezidanto (1986-2000), prezidanto (2001-2010). En 1981, iĝis prezidanto de la Esperanta Asocio de Huangshi kaj fondinto de la

Koresponda Kursaro de Huangshi (1982-1991), kelkdek miloj da kursanoj tra la lando partoprenis la lernadon de Esperanto. Li kompilis lernolibrojn por diversnivelaj kursanoj. Aliĝis al UEA en 1984. Aliĝis al ILEI en 1989 kiel internacie rajtigita ekzamenanto pri Esperanto.

Li multe tradukis por la revuo „El Popola Ĉinio” de 1959 ĝis 1966. Li partoprenis en la traduklaboro de Poemoj kaj Elektitaj Verkoj de Prezidanto Mao Zedong (Volumo 5). Meze de la 1980-aj jaroj, li organizis traduk-konkurson por la revuo „La Mondo”. Li estis la iniciatinto de ĉinesko kaj verkis „Ĉineska Gvidlibro” (2007). Liaj Esperanto-tradukoj inkluzivas ekz. la sekvajn verkojn: „Matenaj floroj kolektitaj en vespero” de Lusin (1981), „Poemoj de Li Bai” (1997, Japanio) (kunlabore kun aliaj), „Triptiko de Amrakontoj de Tang-dinastio” (1998, Penseo), „Kantoj dum Vojaĝo de Homa Vivo” de Bai Juyi (2000). Kelkaj liaj verkoj: „Esperanta Metriko” (1983), „Esperanto-Elementa Kurso” (1992), „Esperanto-Altnivela Kurso”, „HU Parolas Maldelire” (2002) ktp. Li ankaŭ publikigis grandan nombron da tradukoj en „Penseo”. La plej grava traduko estis „La strangaĵoj de Liaozhai” (4 volumoj, n-ro 56 de Serio Oriento-Okcidento, de UEA, 2019), eldonita de Zaozhuang-a Universitato kie S-ro Hu estis honora profesoro.

*ILEI-CN*

## Hispanio



La 1-an de aprilo 2020 forpasis en Madrido la pedagogo, diplomato kaj amiko de Esperanto Ricardo Díez-Hochleitner. Li naskiĝis en Bilbao en 1928. Liaj gepatroj estis Félix Díez, filologo kaj tradukisto, kaj Teresa Hochleitner, deveninta el Bavario. La patro estis poligloto kaj tre aktiva e-isto. Li studis kemion kaj komencis sian karieron kiel profesoro de tiu fako en la Universitato de Salamanko. Tamen, li baldaŭ specialistiĝis pri pedagogio kaj eklaboris pri edukorganizado en la Ministerio de Nacia Eduko de Kolombio kaj en la Iber-amerika Organizo de Eduko. Poste li laboris ankaŭ en postenoj rilataj al la sama fako ĉe la Monda Banko kaj ĉe UNESKO. Li estis nomumita por gravaj postenoj de la Ministerio pri Eduko en Hispanio, kie li forte kontribuis al la Projekto de Ĝenerala Leĝo de Edukado de 1970, kiu grave renovigis la instruadon en tiuj finaj jaroj de la diktatura periodo. Li okupis multajn aliajn postenojn rilatajn al edukado en

internaciaj institucioj, partoprenis en entreprenoj ligitaj al edukado, ĵurnalismo kaj eldonado kaj estis membro de pluraj fondumoj.
Li estas membro de la *Klubo de Romo*, organizaĵo konata pro siaj studoj pri tendencoj de disvolviĝo, tre grava en la 70-aj kaj 80-aj jaroj sed nun iom forgesita. Díez estis membro de ĝia Plenuma Komitato, poste vicprezidanto, prezidanto dum la 90-aj jaroj kaj poste, ĝis sia morto, Honora Prezidanto.

Li estis amiko de Esperanto; laŭ iuj atestoj li mem konis la lingvon, sed pri tio ni ne havas certecon. Lia patro Félix Díez Mateo tamen ja estis grava en la Esperanto-movado. E-isto de 1906, li instruis Esperanton en publikaj lernejoj, gvidis ĉiutagan Esperantan rubrikon en la hispana ĵurnalo „*El Pueblo Vasco*" dum du jaroj kaj verkis „praktikan metodon" de Esperanto. Li kunlaboris en *Literatura Mondo* kaj aliaj revuoj kaj estis membro de la Lingva Komitato de 1921. Li estis estrarano kaj poste prezidanto de la Grupo Esperantista de Bilbao kaj honora membro de Hispana Esperanto-Federacio. Li plu aktivis post la hispana milito kaj prezidis la organizan komitaton de la 27-a Hispana Esperanto-Kongreso, kiu okazis en Bilbao la jaron 1966an. En libro de memoraĵoj Ricardo Diez-Hochleitner parolis tre apreze pri sia patro kaj mencias la idearon de esperantismo, kiu gvidis lin.

*José Antonio* DEL BARRIO

## Rumanio

**Memore al Julia SIGMOND**

*Naskiĝis en Turda (Rumanio), 11 julio 1929. Esperantistiĝis en 1956. Forpasis en Piacenza (Italio), 23 marto 2020*



Nia kara samideanino Julia SIGMOND estis por mi unu el la homoj, kiujn mi tiom admiris, ke mi provis (kaj daŭre provas) ilin imiti. Ŝi uzis tiom bele kaj inteligente la tempon de sia vivo, ŝi havis tiom multajn interesojn kaj tiom multajn talentojn, ŝi agis entuziasme kaj sindoneme en tiom multaj flankoj, ke estas malfacile por mi priskribi ŝian brilan personecon en tiom malgranda kadro. Mi opinias, ke Julia estis tiom eksterordinara homo, ke ŝi meritus unu longan biografian romanon aŭ eventuale plurajn romanojn fare de diversaj aŭtoroj, kiuj konis nur kelkajn aspektojn de ŝia bunta vivo. Unu el la plej emociaj aspektoj de la vivo de

Julia, kapabla inspiri romanverkistojn kaj filmreĝizorojn, estis ŝia fabela romantika amo kaj geedziĝo en la aĝo de 80 jaroj kun la esperantista verkisto Sen RODIN (Filippo FRANCESCHI) el Italio, kiu forpasis 4 tagojn post ŝi.
Mi kredas, ke ĉiu persono, kiu konis ŝin, ricevis de ŝi kelkajn neforgeseblajn spiritajn donacojn: iuj konis ŝin kiel instruistinon pri Esperanto en Transilvanio, aliaj kiel aktorinon ĉe la pupteatro „Puck” en Kluĵo, aliaj kiel verkistinon, redaktoron de la revuo „Bazaro”, aktiviston por la diskonigo de vegetarismo kaj de ekologiaj agadoj, fidelan anon de la Unitaria Preĝejo en Kluĵo, talentan korusanon, orgen-akompananton, amikeman koleginon, helpeman najbarinon, lertan kuiriston de sanigaj bongustaj manĝaĵoj, ameman onklinon aŭ bapto-patrinon ktp.
Mi havis la grandan bonŝancon koni ŝin precipe kiel pli aĝan amikinon. Iuflanke, Julia estis tiom pura kaj sincera kiel infano, aliflanke ŝi estis saĝa kiel maljuna homo, kiu scipovis donaci amon al ĉiuj konatoj kaj ricevi ilian amon.
Kiel instruistino pri Esperanto, Julia estis entuziasma praktikanto de la rekta metodo, kiun ŝi riĉigis, adaptis kaj modernigis per siaj pedagogia kreemo kaj aktora talento. Ŝi plilarĝigis sian instruistan agadon pere de porinfanaj rakontoj. Ŝia kompaktdisko „*Novaj fabeloj pri Ursido Pu kaj Porketo*” estas la unua (kaj ĝis nun la sola) porinfana sonlibro originale verkita en Esperanto. Ĝia valoro estas des pli granda, ĉar Julia uzis sian aktoran talenton por kapti la atenton de la infanoj.
La porinfana rakontaro „*Stecĵo-fabeloj*” estas alia literatura juvelo, kiun Julia donacis al Esperanto-parolantaj infanoj. „*Libazar kaj Tero*”, kiun Julia verkis kune kun sia edzo Sen RODIN, estas tre originala scienc-fikcia romano, kiun la aŭtoroj donacis precipe al adoleskaj parolantoj de Esperanto, sed ankaŭ al plen-aĝaj legantoj.
Okaze de sia 90-jariĝo, Julia respondis al interesa intervjuo en la hungarlingva revuo „*Unitárius Közlöny*” 2019/9. (La intervjuisto estis Klára ASZTALOS). Jen kiel finiĝas la intervjuo:
„Klara ASZTALOS: Kiel homo, kompletiginta sian 90-an vivojaron kaj kolektinta multajn spertojn, kion vi mesaĝas al la post vi paŝantoj, kio estas la plej grava en la vivo?
Julia SIGMOND: Ni provu vivi tiel laŭ la leĝoj de la amo, ke post sunsubiro ni povu diri kun pura koro en nia preĝo: Dankon, Sinjoro, ke ankaŭ hodiaŭ mi ne vivis vane!”

*Luiza CAROL*

# Alvoko al la enlernejaj Esperanto-instruantoj.

*(Alvoko apogata de Katalin KOVÁTS kaj ILEI)*

Kiun neniam iu demandis (aŭ eĉ sin demandis) kiom da Esperanto-parolantaj, kiom da Esperanto-kluboj aŭ kiom da Esperanto-kursoj en lernejoj estas nacie kaj tutmonde?

Tiam, kion respondi krom, ĝenate, „*verdire, mi ne scias*”!

Tamen, laŭ la kunteksto de la demando la konsekvencoj de tia respondo ege gravos por niaj agadoj. Fakte ni devas konscii, ke nun pli kaj pli da regantoj interesiĝas al nia movado; do, tio nin devigas disponi precizajn registraĵojn kaj statistikojn ĉiam ĝisdatigitajn, por senhezite kaj alloge respondi.

Ekzemple: baldaŭ la franca landa asocio „Espéranto-France” devos prezenti al la franca edukado-ministerio bilancon de la unuaj dujaraj eksperimentoj de Esperanto-instruado en lernejoj. Ankaŭ pluraj instruistoj klopodas, por ke ilia lernejo kuniĝu al tiu eksperimento, sed ili havas problemon konvinki sian estraron pro manko da altirfortaj argumentoj; tiuokaze estus mirinde povi proponi larĝan eblon de lernejaj interrilatoj kaj eĉ de ĝemeliĝoj internaciaj. Krome, oni povas konsideri, ke ju pli da lernejoj partoprenos en Francio des pli da alilandaj lernejoj malfermiĝos al la instruado de nia komuna lingvo; ĉu tiu kondiĉo ne esencas por ĝia evoluado?

Bedaŭrinde, tiuteme, ni tute ne kapablas pruvi tion, kion oni ofte diras, t.e. ke mondskale en multaj lernejoj Esperanto instruiĝas.

Tamen, en Edukado.net kie oni povas registri tiajn kursojn *https://edukado.net/prie/sinprezento/statistiko?tipo=lernejajkursoj* enhavas entute malpli ol dekduon da lernejoj bazaj kaj mezaj! Espereble, tio ne spegulas la veron!

Konsekvence, estas lanĉita kiel eble plej larĝe diskonigenda alvoko, por ke ĉiu Esperanto-instruanto en lernejoj nepre registru sian kurson aldonante ĝin al la ĉi-supra listo de kursejoj.
La sukceso de nia movado postulas daŭran sciigon, kunlaboron, partnerecon, por ke ni ĉiuj povu efike argumenti favore al la enkonduko de Esperanto en lernejojn. Tiucele, ĉiu el ni faru sian veran eblon!

*Franca komisiono „Esperanto-ĉe-abituro[3]”*
*A. Andre; G. Camy; M. Juy.*

---

[3] vd. abiturienta ekzameno

# Laboro en lernejoj por progresigi la komprenon de problemoj pri mensa sano (en Niĝerio)

https://www.theguardian.com/world/2019/sep/25/people-heal-thyselves-nigerias-new-mental-illness-approach (elektis kaj tradukis Mireille GROSJEAN helpe de translate-google). **Nils ADLER** *in Lagos* el la gazeto The Guardian 25 Sep 2019

Okazis plej nekutima kunveno kun paciento. D-ro Ayo Ajeigbe akceptis la pacienton en sia privata laborloko en Abuja, la ĉefurbo de Niĝerio, laŭ sia kutima bonveniga maniero. Sed fakte la kuracisto povis trovi, ke nenio malbona estas ĉe la viro. Kaj kiam Ajeigbe demandis, kial li estis tie, la paciento simple respondis: „Mi nur volis vidi, kiel aspektas psikologo."
Eble li ne devus esti surprizita. Profesiuloj pri **mensa sano** maloftas en Niĝerio, kiel estas en multaj aliaj evolulandoj. En la lando kun plej multe da loĝantoj de Afriko - pli ol 200 milionoj da homoj - estas ĉirkaŭ 150 praktikantaj psikologoj. Se kuracadoj pri mensa sano estas maloftaj, neadekvataj kaj ne sufiĉe subtenataj finance en plej multaj okcidentaj landoj, ili preskaŭ ne ekzistas en la plimulto de malpli riĉaj landoj kaj aliaj kun mezaj enspezoj - pli ol 100 landoj tutmonde. En tiaj landoj oni provizas per malmulte da rimedoj por menshigieno, por ili aperas ne multe en la prisanaj buĝetoj kaj ĉiuokaze probable oni elspezas ankoraŭ malpli da mono por tiu kampo. Do, kion fari? Ajeigbe decidis, ke parta respondo kuŝas en la libervola sektoro. Antaŭ unu jaro li konsentis estri la sekcion Abuja de *Mentally Aware Nigeria Initiative* (MANI) Mense Konscia Niĝeria Iniciato, burĝonanta organizaĵo gvidata de uzantoj, rapide aperanta kiel solvo por la krizo en Niĝerio en la kampo de mensa sano. MANI estis lanĉita en 2016 de Victor Ugo, tiama medicina studento el Lagos, kiu suferis deprimon; lia agado devis esti respondo al la manko de subteno al mensa sano en Niĝerio, kie oni supozas, ke sep milionoj da homoj vivas en la sama situacio.
La vizio de Ugo estis antaŭenigi ŝanĝon kreskigante konscion kaj forpelante antaŭjuĝojn ekzistantajn ĉirkaŭ mensa sano en Niĝerio. Kaj merkredon, li aperos ĉe la ĉiujara kunveno de boncelantoj, evento okazanta paralele al la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj en Novjorko, por provi trovi pli da financado kaj pli justan kuracadon por mensa resanigo.
„Se vi havas deprimon", - diras Latifah Yusuf Ojomo, la vic-estro de la Lagos-teamo de MANI, „homoj povas konsideri vin frenezulo, kio signifas, ke la plimulto de la homoj, kiuj havas problemojn pri mensa sano en Niĝerio, ne komprenas, aŭ volas akcepti tion, kion ili sentas."

De la komenco Ugo decidis, ke se MANI havos ian signifan efikon, ĝi devas doni atenton al la plej multnombra popoltavolo de la lando. „Junuloj en Niĝerio estas multe pli malfermitaj al lernado de novaj aferoj” - klarigas Ugo, „ili estas multe pli kapablaj pri manieroj ŝanĝi.”
En Lagos, la plej granda urbo de Niĝerio, MANI lanĉis trejnprogramon por lernejoj. La programo inkluzivos serion de „menshigienaj kluboj”, kie oni instruas studentojn pri traktado de mekanismoj, efikoj de ĉikanado kaj atelieroj por lerni interkonsenti. MANI ankaŭ trejnas instruistojn kaj gepatrojn pri la mensa sano de infanoj, ĉi-lastan grupon, Ugo identigas kiel precipe gravan. „Laŭ la loka kulturo junuloj ne rajtas paroli” - klarigas Ugo, „vi devas aŭskulti; respekto estas vere kerna. Se mi bezonas helpon, mi petas miajn gepatrojn kaj ili decidas, ĉu mi bezonas helpon.”

# PROGRAMSKIZO de la 53-a Virtuala Esperanto-Konferenco ILEI (VEKI) 25-31 julio 2020

**7 tagoj – 7 temoj**

1. Solena inaŭguro, prelegoj pri la kongresa temo. Planeda pripenso.
2. Pripensoj pri strukturo. Komitato
3. Prelegoj pri lingvoj. Lingva festivalo
4. Prelegoj pri interlingvistiko kaj Eo en universitatoj
5. Mastrumado de la Ligo. IPR, JA. Vivo de ILEI, demandoj kaj respondoj. Gastronomia rondo.
6. Pedagogiaj temoj. Instruspertoj
7. AMO – seminario. Internaciaj agadoj, internaciaj institucioj / Konkludo

**Tempoplano**

| | | | | | | | | | | | | | | | | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| UTC+2 NL CH de ES ĝis DE | | | | | | | | | | | | | | | | | | | | | | | |
| 01 | 02 | 03 | 04 | 05 | 06 | 07 | 08 | 09 | 10 | 11 | 12 | 13 | 14 | 15 | 16 | 17 | 18 | 19 | 20 | 21 | 22 | 23 | 00 |
| | | | | Kalifornia sunsubiro | | | | | | | | | | | ĉefplado | | | | | | Azia tagiĝo | | |
| UTC + 9 JP KR | | | | | | | | | | | | | | | | | | | | | | | |
| 08 | 09 | 10 | 11 | 12 | 13 | 14 | 15 | 16 | 17 | 18 | 19 | 20 | 21 | 22 | 23 | 00 | 01 | 02 | 03 | 04 | 05 | 06 | 07 |
| UTC – 8 USA okcidento | | | | | | | | | | | | | | | | | | | | | | | |
| 14 | 15 | 16 | 17 | 18 | 19 | 20 | 21 | 22 | 23 | 00 | 01 | 02 | 03 | 04 | 05 | 06 | 07 | 08 | 09 | 10 | 11 | 12 | 13 |

Blua koloro = ripozo, dormo    Verda koloro = aktivaĵoj

La azia tagiĝo komenciĝos per tridekminuta **japana jogo-kurso**, kiun Mirejo donos.

Ĉiu tago havas sian **temon** kaj **tri sesiojn**; la tago kongruas kun la tago en UTC + 2 (Afriko, Eŭropo). Inter la aktivaĵoj verdaj sur la tempoplano la kanalo estos libera por **koridoraj babiladoj**, kiel en kongreso. Sen ia gvidado.

Anstataŭ Nacia Vespero ni havos **Planedan Pripenson.**

La kutima frandvespero, kiu kutime malfermas la kunvenon de ILEI, havos taŭgan nomon**: gastronomia rondo**: filmu iun tipe tradician manĝon ĉe vi kun familianoj aŭ geamikoj kaj sendu ĝin al ILEI. Maksimuma daŭro: 3 – 5 minutoj. Nepre komencu dirante vian nomon, urbon kaj landon. Montru kaj nomu la manĝaĵon en via lingvo kaj en Esperanto, la manĝmanieron, komentu la manĝaĵojn, originon de ili, kuirmanieron… en kiu okazo oni manĝas tion. Ni havos dum VEKI sesion, kie tiuj filmetoj sekvos unu la alian. Sendu ilin al Elena Nadikova uzante ilei.sekretario@gmail.com.

**Koncertoj, deklamadoj**: ni alvokas al artistoj, petante, ke ili sendu filmeton kun hejma koncerto por ILEI ĝis la 30-a de junio. Daŭro: inter 30 minutoj kaj unu horo. Ni deziras havi en ĉiu sesio la lastan horon kun koncerto. Tio estas, ke ni devus akiri 30 kontribuojn. Ankaŭ povos esti koncertoj en rekta enreta partopreno; por tio iu artisto aŭ artista grupo povas skribi al ilei.prezidanto@gmail.com, dirante: mi pretas ludi je tiu tago je tiu horo! Bonvenon! Pro tio ni ne havos Internacian Vesperon, ĉar ni ne vesperumos samtempe!

La **teknika aspekto**: La konferenco akiros kanalon alireblan per numero kaj pasvorto, kiun ni vaste komunikos antaŭe per nia retejo www.ilei.info.

**Komenco**: sabate la 25-an de julio, ĉefplado 15:00 UTC + 2: Solena inaŭguro.

**Fino**: vendrede la 31-an de julio, azia tagiĝo, 00:00 UTC + 2: Konkludo, adiaŭo.

Ni provos eldoni Konferencan Libron kun resumoj de la prezentaĵoj, filmoj, debatoj, decidoj. Ni faros magran eldonkvanton, tamen ni bezonas kelkajn ekzemplerojn por la bibliotekoj. Pro tio ILEI **alvokas al donacoj** por kovri tiujn kostojn kaj por kovri la kostojn de la reta agado.
La partopreno estos senpaga.

Konstanta informfluo okazas en la ĉefpaĝo de ILEI www.ilei.info

# INFORMOJ PRI ILEI

## Laborkomisionoj

**Ekzamena:** Karine Arakelian (prez.), Mireille Grosjean (vicprez.), Mónika Molnár, Giridhar Rao, Jérémie Sabiyumva, Han Zuwu.
**Elekta:** Aurora Bute (gvid.), Zsófia Kóródy, Rob Moerbeek.
**Kontrola:** Simon Smits, Orlando Raola.
**Lerneja:** Julian Hernández, Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Marija Jerković, Luigia Madella, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi.
**Regulara:** Marija Belošević, Rob Moerbeek, Stefan MacGill. Estrare: M. Grosjean.
**Terminara:** Miroslav Malovec, Ilona Koutny. Estrare: Mireille Grosjean.
**Universitata:** Duncan Charters (gvid.), Renato Corsetti, Gong Xiaofeng „Arko", Goro Kimura, Ilona Koutny, Katalin Kováts, Radojica Petrović, Kristin Tytgat, Vicente Manzano Arrondo. Estrare: Ivan Colling.

## Enmovadaj partneroj (entute 14)

**E@I** (*Edukado ĉe Interreto*): Víťazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske, Slovakio, *info@ikso.net*. Tel: (+421) 902 203 369. Retejo: http://www.ikso.net/eo/.
**Fondaĵo edukado.net** - funkciiganta la paĝaron de instruistoj, instruantoj kaj memlernantoj. Direktoro: **Katalin Kováts**, Spaarwaterstraat 74, NL-2593 RP, Den Haag, Nederlando. Retadreso: *redaktanto@edukado.net.*
**ICH** (Interkultura Centro Herzberg): Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, (+49) 55215983, Trejnsesioj, metodikaj kursoj, pedagogia fakbiblioteko, internaciaj ekzamenoj, kontaktpersono: **Zsófia Kóródy**, *zsofia.korody@esperanto.de.*
**IFEF** (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio): *vd. la Jarlibron de UEA*
**TEJO** (http://www.tejo.org/): Observanto de ILEI ĉe TEJO: **Unika (Yuro Jung)**. Observanto de TEJO ĉe ILEI: **Karina Oliveira.**
**UEA:** Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, *www.uea.org*. Observanto de ILEI ĉe UEA: **Mireille Grosjean**. Observanto de UEA ĉe ILEI: **Duncan Charters.**
*kaj aliaj*

## Ekstermovadaj partneroj (entute 8)

**ALTE** *(Asocio de lingvaj testistoj de Eŭropo)* Repr. de ILEI: **Zsófia Kóródy**,
**FIPLV** *(Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj):* Repr. de ILEI: **Mireille Grosjean.**
**UN** (kun statuso de observanto): komisiitoj de ILEI: **Rob Moerbeek, Ron Glossop, Leysester Miro.**
**Unesko** (kun statuso de observanto): Reprezentantoj de ILEI: **Monique Arnaud** (ĉefdelegito), Ecole Chemin de l'Espéranto, Les Pelloux, FR-05500 Benevent et Charbillac, *monique.arnaud@ aliceadsl.fr*, **Martine Demouy, Max Demouy, Jesper Jakobsen, Josiane Moirand**
*kaj aliaj*

## Membreco kaj pagado por diversaj servoj

**Membreco kostas 20 € en A-landoj** (laŭ la malnova UEA-difino), **10 € en B-landoj kaj 2 € en C-landoj, kun ricevo de 4 numeroj de *IPR* jare. Kun aliro nur al la reta versio de *IPR* membreco kostas 10 € por la A-landoj, 5 € por la B-landoj kaj 1 € por C-landoj**. **Supera membro estas tiu ILEI-membro, kiu mendas paperan IPR kaj paperan *Juna Amiko* (JA). Tio kostas por A-landanoj 32 € kaj por B-landanoj 18 €.** Abono de JA papera kostas 18 € en A-lando, 13 € en B-lando. Abono de JA reta kostas 11 € en A-lando, 7 € en B-lando.Bonvenaj estas donacoj al la kaso de ILEI kaj al la fondaĵoj de ILEI. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas kotizojn kaj donacojn; simile, perantoj por JA akceptas abonojn enlande. Por informi pri viaj pagoj, bonvole skribu al Vilĉjo (Bill) HARRIS, 4 Edgecomb Ct, Portland ME 04013, Usono. <*ilei.kasisto@ gmail.com*>. Bv klare indiki la celon de via pago. La pagoj por ILEI povas okazi a) pere de la nederlanda ILEI-banko aŭ b) pere de la ILEI-konto ĉe UEA. Jen detaloj:

a) Pagoj al la nederlanda banko de ILEI: numero 4676855 ĉe ING Bank N.V., IBAN NL55INGB 0004676855, BIC INGBNL2A. Bonvolu aldoni 5 € por la nederlandaj bankokostoj pagante el ekster EEA (Eŭropa Ekonomia Areo) kaj EU.

b) Pagoj al la konto de ILEI ĉe UEA: Por pagi al UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL 3015 BJ Rotterdam, bv uzi: ING Bank, Postbus 1800. NL-1000 BV Amsterdam (konto: 37 89 64; IBAN: NL72INGB0000378964; BIC/SWIFT: INGBNL2A). Bonvolu aldoni € 5 por la nederlandaj bankokostoj. Indiku vian nomon kaj vian landon, la celon de via pago kaj la konton de ILEI ĉe UEA: ilek-a. Ĝiri monon el via UEA-konto al ILEI-konto ĉe UEA estas facila ago.

* Simpla abono de *IPR* sen membreco: 24 €. Reklamtarifoj por *IPR*: 180 € por plena, 110 € por duona, 70 € por kvarona paĝo. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon; kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.

* ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag (NL) sub numero 27181064 kun sidejo ĉe la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo (NL).

* Retpaĝo de ILEI: http://www.ilei.info.

## REDAKCIAJ INFORMOJ


**Respondeca eldonanto** (verantw. uitgever): Marc CUFFEZ, *Elisabethlaan 295, BE-8400 Oostende*. **Teknika helpo**: Stano MARČEK. **Presado**: Alfaprint, Martin, Slovakio. **Redaktoro**: NÉMETH József, *Fő u. 41/5, HU-8531 IHÁSZ, Hungario, jozefo.nemeth@gmail.com*, *www.ilei.info/ipr/;* tel*: (+36-70) 931-0530.*

Peranto de ILEI kadre de LIBE (Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj): Olena Poshivana, *amatalena@ukr.net*. La revuo aperas ankaŭ kasede registrita por leghandikapuloj. Informas: Rob MOERBEEK*, Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE* BEVERWIJK, *Nederlando, moerbeekr@gmail.com*.


**Ni fermis la nunan numeron la 15-an de aprilo 2020,**
**redaktofino por la sekva numero: la 15-an de aŭgusto 2020.**



*Festa ludvespero okaze de la 70-jariĝo de ILEI*
*(lasta parto de la serio, vd. p. 18)*



*„La strangaĵoj de Liaozhai” – tradukoj de Hu Guozhu (vd. p. 29)*



MARINE ENGLERT • ULRICH LINS • CHRISTIAN LAVARENNE

# Hector Hodler

## Une posture pacifiste / Pacisma sinteno

ÉDITIONS NOTARI